Kia estos la estonteco?

Tiu demando estas, por multaj homoj tre grava en tempo kiam oni praktikis teruradon kaj minacas neniigi la homaron per nukleaj bomboj. (Nuntempe oni eĉ minacas disvastigi sepsajn malsanojn.)

Eble tiuj maltrankviligaj novaĵoj estis la kaŭzo, ke la rakonto naskiĝis en mia cerbo kiam mi ekstudis Esperanton 1966. Post du kursetoj, ampleksantaj proksimume 40 studhorojn, mi opiniis min preta por verkado en Esperanto. ;-)

Antaŭ kelkaj tagoj mi retrovis la rakonton inter miaj esperantaĵoj. Mi tralegis la historieton kaj konstatis, ke mi fakte komprenas tion kion mi iam skribis ;-). Nu la fino ne taŭgis hodiaŭ kaj mi kompreneble posedas multe pli grandan vortoprovizon ol tiam kiam mi unue verkis la historieton. Pro tio mi decidis, ke mi modernigu ĝin iomete.

Multaj certe opinias, ke la rakonto estas iom tro fantazia, tamen kelkfoje tio kio efektive okazas povas superi la fantazion de la verkisto. Ni nur povas esperi, ke la rakonto neniam realiĝos.

Skövde la 1:an de Majo 2008

Eugeno la Svedo

La Mesaĝo (V2008)

Multaj homoj asertas, ke ili havas viziojn per sia "interna okulo" kaj, ke tiuj travivaĵoj estas tre vivecaj kaj kelkfoje aŭguras pri la estonteco.

Nu, saĝaj homoj kutime malestime klarigas, ke tiuj homoj estas trompistoj aŭ, ke ili havas tro aktivan imagipovon. Aliflanke sciencistoj fakte konstatis, ke telepatio kaj klarvido estas eblaj je certa grado, sed oni ankoraŭ ne povis tute klarigi la fenomenon.

Estas sciate, ke la homa korpo generas elektrajn kurentojn kiuj alternas je certa frekvenco. Tial oni teorie povus pensi, ke tiuj tre malrapidaj ŝanĝoj en la kurento povas kaŭzi, ke la homo estas ĉirkaŭata de elektra kampo same kiel ĉirkaŭ la anteno de radioelsendilo. Krom tio, la "pensoj" kiuj estiĝas en la cerbo de la homo plej kredeble estas elektraj impulsoj aŭ frekvencŝanĝoj de la homa elektra kurento. Nu, ne gravas por ĉi tiu rakonto kiel efektive estas.

Lastatempe mi spertis tre strangajn viziojn, ĉiam kiam mi sidas antaŭ la forno trankvile rigardante la fajroflamojn leviĝi el la brulanta ligno.

Pro grandaj malfacilecoj memori detalojn mi nur tre supraĵe povas priskribi kion mi spertis. Alia afero, kiu vere ĝenas min estas, ke mi tute ne povas kompreni kion tiuj vizioj signifas. Mi diras "vizioj" ĉar la travivaĵo konsistas el tri partoj aŭ scenoj

La unua parto.

Sur verda kampo paŝtas tre stranga besto. Mi eĉ devus diri, ke ĝi estas ege granda bestego. Mi dubas ĉu sufiĉas diri "bestego". Mi havas la impreson, ke tiu besto ne estas danĝera aŭ minacema, ĉar ĉirkaŭ la besto mi vidas estaĵojn aŭ eble homojn. Mi vidas, ke la uloj havas ion kio similas du krurojn kaj ion kio similas kapon plej supre. Mi ankaŭ vidas ion kio similas al brakoj sed la konturoj estas tre malklaraj, ja eĉ malakraj. Spite al la malklaraj detaloj mi ĉiam havas la impreson, ke la uloj estas tre kontentaj je la besto kaj provas flegi ĝin je la plej bona maniero. Eble tiu impreso venas de fakto, ke la tuta pejzaĝo estas tre bela kaj donas impreson je granda harmonio.

La dua parto.

La pejzaĝo fadas, t.e. malaperas iom post iom, kaj ŝanĝiĝas al granda salono en kiu troviĝas multaj estaĵoj aŭ uloj. Mi preferas la vorton uloj. La uloj sidas ĉirkaŭ granda tablo kaj direktas siajn vizaĝojn al staranta ulo, kiu ŝajne parolas . Li tenas montrilon en unu el siaj manoj kaj montras al granda mapo kiu pendas sur la muro de la salono. La formoj sur tiu mapo donas la impreson, ke temas pri mapo de nia planedo: La Tero. La parolanto kaj liaj kunuloj aspektas tre maltrankvilaj pro io.

La tria parto.

Kiel antaŭe la sceno fade ŝanĝas kaj finfine mi vidas grandan placon sur kiu staras griza objekto, kiu pli malpli havas la formon de diketa diskego. Ĉirkaŭ la disko troviĝas granda nombro da estaĵoj, aŭ alivorte; ularego. Post iom da tempo mi vidas, ke grupo da kvin uloj kolone marŝas en direkto al la griza diskego, kiu estas ekipita per enirejo ĉe la bazo. Kiam la grupo malaperis en la diskegon la pordo fermiĝas kaj post kelkaj sekundoj la griza diskego leviĝas kaj malaperas en la bluan ĉielon.

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

La vizioj ekaperis tre ofte dum la lastaj tagoj. Lastfoje kiam mi vidis la vizion mi klare vidis, ke la parolanta ulo vere havas homecan aspekton. Mi nun povas vidi la vizaĝon tre klare kaj vidas, ke liaj lipoj moviĝas. Krom tio, mi aŭdis kelkajn vortojn. La stranga afero estas, ke la ulo parolas Esperanton. Mi klare aŭdis la vortojn "sonbendilo" kaj "venontfoje". Incitas min, ke mi ne povas juĝi, ĉu estas vera telepatia travivaĵo aŭ nur produkto de mia propra imago.

Mi iam legis libron pri telepatiaj mesaĝoj. Laŭ tiu libro telepatiaj mesaĝoj tre ofte estas simbolaj. Ial mi ekhavis la impreson, ke mia travivaĵo estas simbola sed mi tute ne povas kompreni la signifon de la vizioj.

Dum pluraj tagoj post kiam mi aŭdis la vortojn "sonbendilo" kaj "venontfoje" mi ne vidis ion. Pasis tiom longa tempo, ke mi decidis, ke la vizioj certe estis produkto de mia propra imago.

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

Tamen, post kelkaj semajnoj la vizioj reaperas kun pli granda klareco en la detaloj. La detaloj nun estas tiel klaraj, ke mi bone vidas, ke la uloj en la granda salono havas tute normalan homan aspekton. Mi ankaŭ povas aŭdi, ke ili parolas Esperanton. Inter alie mi aŭdis la parolanto diri: "Nia grupo nun estas tiel proksime, ke ili povas instrui nian kontaktulon, ke li ekfunkciigu sonbendilon por registri nian mesaĝon".

Do, finfine mi scias, ke temas pri mesaĝo, sed de kie ĝi venas? Mi multe cerbumis pri la afero kaj dum periodo mi kredis, ke mi malsaniĝis mense. En mia laboro mi plurfoje renkontis homojn kiuj plendas, ke nekonataj homoj provas enpenetri iliajn cerbojn per radiado. Tiu personoj tre ofte asertas, ke ili protektas sin per metala folio kiun ili vindas ĉirkaŭ sia kapo aŭ gluis sur la murojn en iu malgranda ĉambro kie ili kutimas dormi. Mi bedaŭrinde devas konfesi, ke mi ĝis nun ne kredis tiujn homojn. Mi sincere kredis, ke ili estas mense malsanaj sed tute sendanĝeraj por aliaj homoj.

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

Pasis ankoraŭ tri semajnoj dum kiuj la vizioj ne ĝenis min. Tamen unu vesperon mi spertis tute novan vizion. Ĉi foje mi vidis kvin personojn kiuj sidas en iu strange ekipita kajuto. Je la unua rigardo mi kredis, ke temas pri la kajuto en iu el la spacveturiloj kiujn Usono sendis en la spacon. Tiuj navedŝipoj oni utiligis por transporti materialon kaj riparistojn al malfunkciantaj satelitoj aŭ al la granda spacstacio, kiun oni ĵus estas konstruanta. Tamen post kelke da momentoj mi komprenis,

ke ne povas esti tiel, ĉar la personoj fakte interparolis en Esperanto kaj tiu lingvo ne estas favorata de la Usonaj aŭtoritatoj.

Ĉi foje mi fakte povis aŭdi kelkajn frazojn. Jen kelkaj el ili: " Ni nun estas tiel proksime, ke ni registras, ke nia kontaktulo povas percepti niajn pensojn. --- Post du tagoj ni povas fari nian avertan elsendon al li. ---- Jam nun ni certas, ke li perceptas, ke li ricevas telepatian mesaĝon. --- Bonvolu prepari sonbendilon por la registrado de nia mesaĝo. --- "

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

Hodiaŭ estas la dua tago post kiam mi ricevis la vizion kun la instruoj de la kvinopo en la stranga kajuto. Mi jam aktivigis la sonbendilon kaj metis la mikrofonon en oportuna loko.

Mi nun komprenas, ke la mesaĝo venas el homoj kiuj vivas sur alia planedo ol la Tero. Mi ankaŭ komprenas, ke la kvin personoj en la stranga kajuto estas telepatiistoj kiuj estas komisiitaj kontakti min kaj uzi min kiel ricevilo por averta mesaĝo.

Mi sidiĝas en mia plej preferata fotelo kaj ekrigardas la fajroflamojn en la forno. Post iom da tempo fade aperas la vizio kun la kvin telepatiistoj. Unu el ili komencas paroli kaj ĉi tiun fojon mi fakte aŭdas voĉon kiu parolas Esperanton kun sveda akĉento. Post kelkaj sekundoj mi komprenas, ke estas mia propra voĉo kaj, ke mi ne kontrolas mian parolon.

La bobenoj sur la sonbendilo rotacias malrapide kaj la verda "okulo" palpebrumas laŭ la ŝanĝoj de mia voĉo. Do, la maŝino funkcias bone kaj espereble registros la mesaĝon kiun la telepatiistoj intencas transdoni al la tera homaro.

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

La mesaĝo.

Unue ni volas prezenti nin. Ni estas la plej kapablaj telepatiistoj el la planedo EKSTERO. Tiu planedo troviĝas ie en planeda sistemo en la galaksio kiun viaj astronomoj nomas "La Lakta Vojo". Ni scias, ke vi jam obeis nian ordonon prepari sonbendilon por registrado de nia mesaĝo.

Nun, rigardu la beston precize. Ĉar ĝi estas la plej grava parto de la vidaĵo kiun vi ricevis dum la lastaj monatoj. Vi perceptis, ke la besto aspektas strange kaj tio estas ĝuste ĉar ĝi estas kombino de partoj el diversaj bestoj. Ĉi tiu besto estas la "universala dombesto". Ĝi donas ĉion kion homoj bezonas por vivteni sin.

La besto kutime estas tre pacema kaj tute maldanĝera. Ĝi nutras sin per la mineraloj en la tero. Ĝi povas eĉ liveri elektran forton kaj materialon por vestoj. Ĉi tiu besto do simbolas vian nunan tekniknivelon, kiu fakte, spite al siaj avantaĝoj, minacas detrui la tutan planedon.

La granda problemo estas ke Vi, t.e. la Teranoj, ne komprenas ke la planedo Tero estas tre grava parto en la planeda sistemo kies centra parto estas la Suno. Vi ankaŭ ne scias, ke jam antaŭ pluraj jarmiloj, pli precize proksimume antaŭ 12500 jaroj, altnivela kulturo malaperis sur la Tero pro grandega natura katastrofo.

Tiu grandega katastrofo estis kaŭzita de sciencistoj kiuj tiam eksperimentis per la fortoj en la universo kaj provis kapti malgrandan planedon aŭ, kiel kelkaj nomas tiujn objektojn, asteroido, kiun oni intencis meti en trajektorion ĉirkaŭ la planedo Tero. La intenco estis, ke oni uzu tiun asteroidon por avanaj biologiaj eksperimentoj La eksperimentoj tamen tute fiaskis kaj kaŭzis grandegan katastrofon sur la Tero. Nur certa nombro de la tiutempaj homoj sukcesis fuĝi el La Tero. Ni estas idoj de tiuj fuĝantoj kiuj elektis la planedon EKSTERO kiel sia nova loĝloko.

Tamen, kelkaj el la sciencistoj tiutempe opiniis, ke la katastrofo ne estos tia, ke ĝi detruos la Teron tute. Tial oni kalkulis je la ebleco, ke multaj homoj sur la Tero travivos la katastrofon. Pro tio , ke oni ne povis transloki ĉiujn homojn de la Tero antaŭ la katastrofo, oni kreis grandan memorigan monumenton aŭ pli precize aron da grandegaj konstruoj kiuj estis lokigitaj kaj konstruitaj sur tia loko kaj en tia maniero, ke ili kun tre granda certeco travivu la efikojn de la katastrofo. Sur la plej granda el tiuj konstruaĵoj oni engravuris la plej gravajn sciojn kiujn oni akiris en tiu altkulturo.

La espero estis, ke la homoj, kiuj travivos la grandegan katastrofon, per la instruoj sur la memoriga monumento estu kapablaj rekrei la aparatojn kiuj estis uzataj por interalie krei elektran energion. Bedaŭrinde neniu el la alte edukitaj homoj travivis la katastrofon ĉar ili tiam troviĝis sur la kontinento kiun vi hodiaŭ nomas Antarkto.

Pro tio ke la homoj, kiuj trovis la memorigan monumenton, ne estis sufiĉe evoluiĝintaj kaj eĉ ne scipovis legi la instruojn sur la memoriga monumento la evoluon sur via planedo sekvis tute aliajn principojn, precipe dum la tempo tuj post la grandega katastrofo.

La plej bedaŭrinda afero estas, ke la engravuritan kovraĵon el blanka ŝtono, sur la plej granda memoriga konstruaĵo, estas forprenita kaj uzata je novaj konstruoj en apuda urbego.

Antaŭ kelkaj jaroj niaj informantoj sur la Tero informis nin, ke almenaŭ unu persono ekkonsciis, ke la tri grandaj konstruaĵoj ne estas tri unuopaj konstruaĵoj, sed konstruitaj samtempe kaj laŭ tre precizaj konstruplanoj.

Por ĉi tiu mesaĝo sufiĉas mencii, ke la konstruplanoj estas bazitaj je Eŭklide konstruitaj trianguloj kun laterproporcioj je 1 – 2 - √5 , 3-4-5 kaj 3-5-7. La dimensioj de la konstruaĵoj estas akirita per projekciado de punktoj. La matematikaj kalkuloj estas je la sama nivelo kiun viaj junuloj aplikas dum gimnaziaj studoj. Bedaŭrinde tiu persono, kiu malkovris la ĝeneralan planon de la memoraĵoj, ne povis konvinki fakulojn, ekz. matematikistoj, ke liaj eltrovoj estas esplorindaj.

La problemo eble estis, ke tiu homo provis prezenti la tutan konstruplanon anstataŭ nur provi konvinki la fakulojn, ke la centropunktoj por la tri grandaj konstruaĵoj estas troveblaj per geometria projekciado de du punktoj ene de konstrureto bazita je la triangulo 3-5-7. *1)

Hodiaŭ viaj sciencistoj jam faris avanajn eksperimentojn, kiuj rilatas al la nukleaj fortoj kaj oni eĉ provas transporti materialon per radiado. Oni ankoraŭ ne atingis la nivelon kiam tiuj scioj pri materialtransportado danĝerigas vian planedon kaj nian planedon. Tamen la nukleaj bomboj kiujn oni testis dum pluraj jaroj grave ŝanĝis la ekvilibron en la spaco de via apudeco. Unu el la indikoj, ke la balanco estas ĝenita estas, ke la luno iom post iom malproksimiĝas je malgranda distanco ĉiun jaron.

Je la nuna momento la nukleaj bomboj estas la plej danĝera afero, ĉar la materialo por tiaj bomboj nuntempe estas akirebla de ĉiuj kiuj havas sufiĉe da mono. Bedaŭrinde tiuj homoj ne havas normalajn limigajn funkciojn en siaj cerboj ĉar ili kredas, ke nur estas la "malamiko" kiu estos trafata de la efikoj de nuklea bombo. La bedaŭrinda afero estas, ke la eksperimentoj per nukleaj bomboj kreis grandan stokon da splitebla materialo kiun oni ne scias kiel detrui. Tiu nuklea materialo kaŭzos al vi Teranoj grandajn problemojn dum multaj jaroj.

La kaŭzo ke vi ne povis aŭdi pri kio la homoj en la kongresa ĉambro parolas estas, ke ili troviĝas tro malproksime por ke vi perceptu la elsendojn de tiuj homoj kun ordinara telepatia kapablo. Tial oni elektis nin por kontakti vin el loko multe pli proksima. Nia tasko estas klarigi por vi kaj la ceteraj homoj sur la planedo TERO kio okazos se vi ne tuj faras ion por forigi la minacon kontraŭ la universo.

Do, unu parto de la stranga "dombesto" simbolas la nuklean energion. Tiun energion oni eble uzu por pacaj celoj. Eĉ tiaj celoj ne estas tute sendanĝeraj. Vi eble memoras kio okazis en Ĉernobilo kie

teknikistoj, laŭdire kun tro granda memfido, provis fari eksperimenton per la nuklea reaktoro en la nuklea centralo.

Bedaŭrinde ni, ĝis nun, malsukcesis konvinki la Teranojn ke urĝas. Ni multfoje kontaktis teranojn kiujn ni prenis en niajn spacveturilojn kaj montris al ili nian teknikon kredante, ke ili povu konvinki siajn kunhomojn, ke ili devas komenci pensi laŭ aliaj penslinioj.

La ĝisnuna rezulto estas, ke oni ridegis kiam tiuj personoj asertis, ke ili veturis en "NIFOJ" aŭ kiel kelkaj nomas ilin "flugantaj subtasoj". Multaj homoj vidis niajn veturilojn dum kiam ni faris niajn kontrolojn pri la statuso de la planedo Tero. Tiujn homojn oni povas priskribi kiel "honestaj homoj". Bedaŭrinde "honesteco" ne estas alte taksata inter politikistoj kaj gvidantoj de la industrio sur la Tero. Tiuj homoj unue interesiĝas pri "ekonomia gajno" por si mem kaj siaj partianoj.

Ni bedaŭras, ke vi estas civitano en "neŭtrala" lando, kiu eble suferos malagrablaĵon, se vi estos malkaŝota antaŭ ol vi liveris vian mesaĝon al viaj komisiuloj ekster Svedio.

La homoj en la kongresa ĉambro estas la gvidantoj de nia socio kiu konsistas el multaj planedoj en la parto de la universo kiun vi nomas "la lakta vojo". Oni diskutas kion oni faru, se nia avertmisio malsukcesas.

Multaj el la kontaktuloj kiujn ni antaŭe kontaktis eble miskomprenis la aferon ĉar oni ĉiam diras, ke ni volas pacon. Tamen se ni estos sufiĉe grave minacata ni, cele je memdefendo, povas utiligi malagrablajn metodojn kiuj eĉ povas esti perceptataj kiel agresemaj. Tial, spite al la protestoj de multaj el la partoprenantoj, la konsilantaro decidis, ke oni dormigu la tutan homaron sur la tero, krom tiuj popolgrupoj kiuj ja ne ankoraŭ atingis "altan civilizon". Tiu kiun vi vidis en via vizio estas homo kiu montras al tiuj partoj de la tero kie tiaj homoj vivas. Tiuj homgrupoj estos ŝparotaj por la estonto.

Ni volas substreki, ke la motivo de niaj agoj estas memdefendo. La agmaniero de la teranoj estas minaco kontraŭ la sekureco de nia planeda sistemo.

Pro tio ke ni nun intervenas je sufiĉe frua tempopunkto vi havos kelkajn jaron je via dispono por ŝanĝi la situacion. Post kiam vi liveris nian mesaĝon al viaj komisiuloj ni kontaktos ilin persone kaj donos instruojn kiel ili agu estonte. Ni kompreneble ne intervenos se ni registros, je niaj estontaj kontroloj, verajn positivajn ŝanĝojn en la agmaniero de viaj politikistoj kaj teknikistoj.

Konklude: La plej grava je la nuna momento estas, ke oni tuj solvu la problemon pri la nuklea materialo kiun oni komencas vendi al mense malsanaj grupoj sur via planedo. Ne gravas ĉu estas registaroj aŭ unuopaj personoj kiuj misuzas la konojn pri la nukleaj fortoj. Ili same minacas la sekurecon de nia parto de la universo.

Ek de nun vi estos sub nia influo ĝis kiam vi transdonis vian raporton al viaj komisiuloj

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

Post kelkaj momentoj mi rimarkas, ke la fajro nur konsistis el ardantaj karboj kiuj de tempo al tempo ekflamiĝas. Ĉu mi sonĝis? Mi revolvas la sonbendon ĝis la komenco kaj ekfunkciigas la sonbendilon. Aŭdante: "Unue ni volas prezenti nin. Ni estas la plej kapablaj telepatiistoj el la planedo EKSTERO. Tiu pla … " , mi konstatis, ke ne estis sonĝo kiun mi travivis dum la pasinta duonhoro. Post tio mi serĉas la finon de la sonregistraĵo kaj registris la jenan aldonon: "Vere maltrankviligas min, ke tiuj homoj scias, ke mi ŝpionas por fremdaj landoj. Mi tamen devas konstati, ke mi povas fari nenion por ŝanĝi tion kaj tial mi ekprenas mian tekon kaj metas la sonbendilon kun la sonbenda registraĵo en ĝin. Mi intencas tuj transdoni la sonbendilon kaj la alian materialon al miaj komisiuloj."

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

Kiel kutime mi, kun granda zorgo, alproksimiĝas la domon kie mia komisiulo vivas. Ĉi foje mi observas, ke staras maljuna viro antaŭ la enirejo de la domo. Mi pasas la viron kaj ĵetas rigardon al la fenestroj de la apartamento kie mia kontaktulo vivas.

Nenio maltrankviliga estas videbla. La kurtenoj estas aranĝitaj en la kutima maniero por montri, ke ĉio estas en ordo. Tamen mi decidas, ke mi rondiru la kvartalon almenaŭ ankoraŭ unu fojon antaŭ ol mi eniru la grandan ludomon kie mia kontaktulo disponas je apartamento sur la tria etaĝo.

Kiam mi revenas al la enirejo la maljuna viro estas malaperinta. Mi kontrolas la kurtenojn en la fenestro de la apartamento kie mia kontaktulo vivas kaj konstatas ke nenio ŝanĝiĝis. Se estus ia danĝero mia kontaktulo avertos min per speciala signalo. Li tiam forigas la kurtenojn en unu fenestro kaj metas sitelon kun fenestropurigiloj sur la fenestrobreto ŝajnigante, ke temas pri preparoj por fenestro purigado. Tial mi eniris la ludomon kaj piediris ĝis la kvara etaĝo. Kiam mi pasas la pordon kie mia konatulo loĝas mi ree kontrolis ĉu estas iaj signoj, ke ne estus oportune viziti lin. Mi facile konstatas, ke la ŝildo kun la teksto "Mi parolas Esperanton" pendas, kiel kutime, sur sia hoko.

Veninte al la kvara etaĝo mi inspektas la nomŝildojn sur la pordoj. Se estas ia danĝero mia kontaktulo metus kovrilpaperon de certa bonbono sur la fenestrobreton de la kvara etaĝo. Temas pri bonbono kiun oni normale ne povas aĉeti en Svedio.

Do post ĉiuj sekureckontroloj mi finfine decidas reiri al la tria etaĝo kaj premi la butonon de la sonorilo je la apartamento de mia kontaktulo. Mi premas la butonon kvarfoje laŭ sistemo kiun nur mi kaj mia kontaktulo konas.

Post kelkaj sekundoj la pordo estas malfermata. Je mia granda surprizo la maljuna viro, kiun mi antaŭe vidis ekster la ludomo, malfermas la pordon. La maljuna viro diras: "Bonvenon, ni atendis vian viziton al s-ro Andersson".

Mi neas, ke mi volas viziti "s-ron Andersson" kaj klarigas, ke mi nur intencas demandi "s-ro Andersson" ĉu lia najbaro, kiu estas foririnta, donis al li pakaĵon kiu havas mian nomon. La maljunulo tiam diras: Ne estas eblas nei. Ni observis viajn vizitojn al s-ro Andersson dum la lastaj monatoj kaj bone konas viajn "sekurecmesaĝojn". S-ro Andersson jam estas enkarcerigita pro ŝpionado.

Ŝajne la polico scias ĉion. Mi decidas, ke mi nur povas obei la ordonon sekvi la maljunulon al la loka policejo kie li, laŭ sia propra eldiro, pridemandos min.

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

Dum la pridemandado mi ekscias, ke la "maljunulo" estas komisaro ĉe la sekureca polico kaj, ke li kaŝe sekvis min dum pluraj monatoj. Li diras, ke li estas tre mirigita pro mia konduto. Li informis min, ke li plurfoje aŭskultis la sonbendon kaj demandas min fojon post fojo pri la koda ŝlosilo por tiu stranga teksto. Li ŝajne kredas, ke la mesaĝo el EKSTERO estas iu sekreta mesaĝo al miaj komisiuloj. Mi ĉiam respondas, ke ne estas mi kiu parolas sur la sonbendo sed iu alia kiu prenis kontrolon je miaj parolorganoj. La ridegoj de la komisaro eĥas en mia kapo kiam mi revenas al la soleco en la ĉelon.

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

Post pluraj semajnoj da pridemandado oni perdis la intereson pri mi kaj mia sonbendo. Oni anstataŭ petis frenezulkuraciston esplori mian menson. Dum pli ol du monatoj mi devis respondi tre strangajn demandojn. La demandoj similas tiujn kiujn defendadvokatoj kutimas fari al atestanto kiu minacas lian klienton. Komence mi tute rifuzis diri ion al la kuracisto. Mi postulis, ke li metu ŝaltitan sonbendilon sur la tablon kaj registru nian konversacion. Post iom da tempo la kuracisto cedis kaj kunportis grandan sonbendilon al la ĉambro kie ni renkontis.

Mia espero estas ke la telepatiistoj el EKSTERO ankoraŭ foje sendu sian averton per mia voĉo dum la pridemandado de la kuracisto. Ankaŭ la kuracisto perdas la intereson por mia kazo post iom da tempo kaj ordonas, ke mi estu enkarcerata por la resto de mia vivo, ĉar oni ne povas ekskludi la eblecon, ke mi spite al mia trankvila konduto estas danĝera por aliaj homoj. La nura komplezo kion oni permesis al mi estas, ke mi rajtas havi sonbendilon en mia ĉelo. Tial eblas por mi registri iun ajn mi volas. Mi suspektas ke oni tre zorge aŭskultas tion kion mi registras.

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

Hodiaŭ estas precize kvar jaroj post kiam oni arestis min. Ial mi kredas, ke hodiaŭ estas la lasta fojo kiam oni permesos al mi uzi la sonbendilon. Mi nur povas bedaŭri ke miaj eldirojn ne estas konfirmataj de la telepatiistoj el EKSTERO.

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

Jaro 2099 la unuan de januaro okazis tio kion oni timis ek de la granda atako kontraŭ Nova Jorko en Usono en septembro la 11:an 2001. La organizo Alkaloido, kiun oni provis ekstermi, kreskis kaj iĝis pli kaj pli forta spite al la penoj de Usono malhelpi la organizon ricevi monon el siaj subtenantoj.

La organizo sukcesis meti nukleajn bombojn en preskaŭ ĉiuj grandaj urboj en Usono kaj Eŭropo. Iu, plej kredeble iu parenco de la fifama Malsama Bindladino, eksplodigis tiujn nukleajn bombojn samtempe. La atako estis sekvata de misilaj atakoj kontraŭ suspektindaj lokoj en Afganistano, Pakistano kaj en Afriko. La unu nura kontinento kiu ne estis afektita de la bomboj estis Aŭstralio kie la aborigenoj revenis al la vivostilo kiun ili havis kiam la blankuloj okupis ilian kontinenton. La sama validis por malgrandaj regionoj en la rivera sistemo de Amazono. Tiuj "primitivuloj" fakte ne sciis, ke la mondo preskaŭ estas estingita pro atakoj kun nukleaj bomboj kaj pro tio daŭrigas sian vivon en sia kutima maniero.

0-0-0-0-0-0-0-0-0

Du mil jarojn post la granda nuklea milito arĥeologistoj alvenis al loko sur la maro kie oni opinias ke granda kontinento subakviĝis. Subakviĝisto kun skafrando peze malsupreniris en la akvon laŭ ŝtupetaro kiu pendis ĉe la flanko de la esplorboato. Post duonhoro li revenis al la surfaco portante plumbkeston. Responde al la demando. "Kie vi trovis ĉi tiun keston?" li diris: "Mi trovis ĝin en domo kun kadroj antaŭ la fenestroj, plej kredeble iu tipo de malliberejo."

La arĥeologistoj tuj komencis malfermi la keston kaj trovis en tiu aparaton, kiun unu el la plej spertaj arĥeologistoj rekonas kiel sonbendilo el la 21:a jarcento. Li ankaŭ sciis, ke oni devas utiligi 220 unuoj de EMF (elektromova forto) je tre malforta kurento , eble nur kelkaj milonoj de KI-unuo (kurento intenca unuo). La sonbendo sur la bobenoj ŝajnis esti en bona stato kaj kiam la arĥeologistoj ekfunkciis la sonbendilon oni aŭdis voĉon diri:

" Hodiaŭ la nuklea milito komenciĝis kaj mi scias, ke baldaŭ ĉiuj "civilizitaj" popoloj estos mortaj. Ĉiuj gardistoj jam dormas kaj mi sentas, ke la fino estas proksima ankaŭ por mi. Mi metas mian sonbendilon en plumbkeston kie ĝi havos eblecon konserviĝi dum mil jaroj aŭ pli. Mi esperas, ke iu en la estonteco trovos la keston kaj tiam komprenos la seriozecon de la mesaĝo el EKSTERO. Mi volas substreki: La mesaĝo NE ESTAS BLUFO! Estas la absoluta vero. Mi ….."

Subite eliĝis fumo el la sonbendilon kaj la arĥeologistoj devis rapide savi la sonbendon el la ekbrulanta sonbendilo. Unu el la viroj diris al sia kolego: " Tiu ĉi estas bona ebleco por revivigi delonge mortintan lingvon. Eble ni havos utilon de la enhavo en la estonteco. Ili eble jam de longe solvis la problemon pri homa kunestado. Nuntempe oni ne scias kiam oni havos superbombon sur la kapon.

0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0

*1) La historieto estas fantazia, tamen la menciita konstrureto estas reala. La kreinto de la konstrureto, Lehel Repits/Kopping, bedaŭrinde mortis el la jaro 2000, en aprilo.

Mi ne estas matematikisto kaj nur povis analizi liajn teoriojn el prikalkula vidpunkto. Tiom kiom mi komprenas la kalkuloj estas ĝustaj kaj ili fakte donas relativajn distancojn inter la centropunktoj de la grandegaj monumentojn ĉe El Gize en Egiptujo kiuj indikas, ke la geometria ĝenerala plano povus esti la origina plano.

Krom tio, Lehel Repits/Koping montris, ke eblas trovi distancojn en la geometria konstrureto kiuj, je granda precizeco kongruas kun la mezuroj en la konstruaĵoj. Mezuroj, kiujn egiptologiistoj prezentis sen kono pri la geometria konstrureto de Lehel Repits/Kopping. Mi nur povas bedaŭri, ke neniu profesia matematikisto analizis la konstrureton kaj la konstrupricipojn kiujn Lehel Repits/Kopping aplikis en sia analizo kaj komparis la rezultojn kun ekz. satelitaj fotografioj de la piramidaro ĉe El Gize en Egiptujo. Laiko kiel mi tamen ne povas pruvi, ke ne temas pri hazardo. La plej grava afero estas ke ĉiuj distancoj estas trovataj per projekcio de certa punkto sur linio kiu estiĝas en la konstrureto.

Jen adreso kie vi povas vidi liajn desgnaĵojn: http://hem.fyristorg.com/geometri/lr/index.html

Jen informpaĝo: http://www.earthmatrix.com/forum.html kie oni interalie spekulativas pri la Granda Piramido. La italo Alfonso Rubino spekulativas laŭ la samaj principoj kiel LR/K, sed li opinias, ke la triangulo 3-4-5 estas la bazo por la konstrureto kiun li prezentas. La interesa afero estas, ke li ŝajne opinias, ke la ceteraj piramidoj sur la altplataĵo fakte havas ian rilaton al la dimensioj de la Granda Piramido.

Je provo kontroli la rezultojn de LR/K per Google Earth montriĝas, ke la distancoj inter la centropunktoj de la tri grandaj piramidoj iĝas inversaj kompare kun la distancoj kiujn LR/K prezentas post sia projekciado je 30 gradoj. Ĉu tiu rezelto povas dependi de fakto, ke la fotoj de la piramidplataĵo en Google Earth ne estas faritaj je orta angulo rilate al la piramidoj. Mi nur povas diveni.

Eble lerta matematikisto povus konstati aŭ refuti tion. LR/K faris la projekcion je 30° pro tio, ke la distancoj sur oficiala mapo estis inversaj kompare kun la distancoj sur lia geometrie konstruita "mapo" de la piramidaro ĉe El Gize en Egiptio.